n-ro 37

julio 1992

ISSN 0941-9306

Internacia
Komerca kaj
Ekonomia
Fakgrupo

# La Merkato

## Glosaro "Economie, finance, monnaie" de la EÛropa Komunumo

La versio esperanto-franca-angla prizorgita de IKEF estis eldonita en malgranda kvanto. Ekzempleroj estos haveblaj dum la UK en Vieno je po 300 belgaj frankoj (aû egalvaloro, ekz. 100 ŝilingoj). Versio sur komputila disketo (5¼" aû 3½", WordPerfect 5.1-formato) kostas 200 frankojn.

Por sendo per poŝto aldonendas 100 frankoj al la menciitaj prezoj.

/RR

## Enhavo:

Glosaro "Economie, finance, monnaie"
de la EÛropa Komunumo ............................ RR 1
Taûgaj agadeblecoj por IKEF-anoj ............... FJB 3
Komercaj aconcoj en la Revuo Monato .............. RR 4
Kion okazigos IKEF dum la kongresa semajno en Vieno? FJB 5
Internacia Studumo pri Turismo kaj Komerco ........ RR 5
Revuo Monato ..................................... RR 6
Instruigaj projektoj pri ekonomio ................ RR 6
Komercdeziraj leteroj! ........................... dk 6
Projektproponoj por IKEF ...................... RR/dk 7
Bonvenon al niaj novaj aliĝintoj! ............. RR/dk 8
Donacoj .......................................... RR 8

**La Merkato** (LM) estas organo de **IKEF**. Gi aperas kvaronjare kaj servas al la membraro kiel komuna komunikilo.

La Estraro de IKEF: S-ro Franz Josef **Braun** (FJB), Prezidanto kaj Generala Sekretario; S-ro Roland **Rotsaert** (RR), Financa Konsilanto; D-ro István **Gether**; S-ro François-Xavier **Gilbert** (FXG); D-ro Marco **Picasso**; S-ro Seikô **Yamasaki**; S-ro Daniel **Kōnig** (dk).
Revizoro por la financa raporto: D-ro Gianfranco Polerani.

**Centra sidejo:**
Ce s-ro Franz Josef **Braun**, Hornisgrindestraβe 8, D-w7580 Bühl 16, FR Germanio

**Financa sidejo kaj membrara administrado:**
Ce s-ro Roland **Rotsaert**, Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge, Belgio, *telefono:* +32.(0)50.330004

**Redaktora sidejo:**
Ce s-ro Daniel **Kōnig**, Schwarzwaldstraβe 47 D-w6800 Mannheim 1, FR Germanio, *telefono:* +49.(0)621.821710

La jara **membrokotizo** estas 400 belgaj frankoj, 20 nederlandaj guldenoj, 20 germanaj markoj aŭ 10 usonaj dolaroj. Ĉiuj, kiuj intencas kunlabori por subteni la klopodojn apliki Esperanton en komerco kaj ekonomio estas invitataj iĝi IKEF-ano. Dumviva membreco akireblas pere de unufoja egalvalora pago de la 20-obla membrokotizo.

**Kontoj**: Ĉe UEA kaj ĉe FEL, kodo ikef-c,
*aŭ* ĉe Belga poŝtĉekkonto, Bruselo n-ro 000-1592629-83, je la nomo de **IKEF**, p.a. S-ro Roland **Rotsaert**.

**Perantoj:**

**Francio**: S-ro François-Xavier **Gilbert**, Vert Coteau, F-55000 Longeville en Barrois, (CCP 1275-89 L Nancy)

***FR Germanio***: S-ro Franz Josef **Braun**, Hornisgrindestraβe 8, D-w7580 Bühl 16, (Volksbank Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400)

**Hispanio**: S-ro Pedro Antonio **Macanás Valverde**, Av. Libertad, 6-2, E-30009 Murcia, (Banco Hispano-Americano 0049, Asoc. Grupo Esperantista "Ricardo Codorníu", n-ro 672-1; Kotizo: 1250 ptas.)

***Hungario***: D-ro István **Gether**, Palóc u. I, H-1135 Budapest XIII

***Italio***: D-ro Marco **Picasso**, via de Gasperi 7, I-20057 Vedano al Lambro

***Japanio***: S-ro Seikô **Yamasaki**, 185 Tôkyô, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12, (Poŝtĝirkonto, n-ro 6-253232; Kotizo: 1400 enoj)

***Jugoslavio***: S-ro Sotir **Taleski**, ul. 'Oslo'br. 12, YU-91000 Skopje

***Togolando***: S-ro Gbeglo **Koffi**, B. P. 13169, Nyékonakpoé, Lomé



## Taŭgaj agadeblecoj por IKEF-anoj

Fine de la estrara raporto pri la agado de IKEF dum 1991 aperinta en La Merkato n-ro 36 paĝoj 5-7, ni anoncis publikigon de taŭgaj agadeblecoj, aparte por niaj novaj membroj.

Unue ni volas citi nian statuton tiurilate: (mallongigita):

"IKEF celas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en la kampoj komerco, ekonomio kaj ekonomia scienco. Gi provas atingi tiun ĉi celon per jenaj agadoj:

- eldoni ĝisdatigitajn fakajn terminarojn;
- ebligi renkontiĝojn de membroj, organizi studseminariojn;
- helpi membrojn, kiuj uzas Esperanton en siaj komercaj rilatoj, ekzemple faciligante reciprokajn interŝanĝojn de informoj;
- eldoni fakan revuon aŭ bultenon kaj/aŭ subteni eldonadon de tiaj revuoj aŭ bultenoj;
- verki fakajn artikolojn en la Esperanta gazetaro;
- instigi al aperigo de komercaj anoncoj en la Esperanta gazetaro."

La statuto estis kreita en la jaro 1985. Intertempe ni havas praktikajn spertojn. El tio montriĝis jenaj agadoj fareblaj kaj utilaj:

- Terminara laboro. Kreado de terminaroj pri komerco/ekonomio. Anoncu vin al nia Terminara Sekcio, gvidanto s-ro Wiersch (IKEF 19);
- Verkado de fakaj artikoloj pri ekonomiaj temoj; prezentado de ili en MONATO, internacia magazino sendependa por politiko, ekonomio kaj kulturo, aŭ en alia esperantlingva revuo;
- Havigo de reklamanoncoj de entreprenoj al Esperantistaj revuoj (ekze MONATO); tio alportas monon al niaj kasoj kaj montras al la varbanto la utilon de Esperanto;
- Etikedservo. Traduki Esperanto-version de plurlingvaj etikedoj, korespondaĵoj aŭ uzinstrukcioj kaj oferti tion al fabrikistoj;

- Tradukservo. Traduko de esperantlingvaj ofertoj kaj aliaj korespondaĵoj inter Esperantistoj kaj ne-Esperantistoj (persone konataj komercistoj);
- Perado inter Esperantistaj komercistoj por realigo de komercado surbase de la internacia lingvo.
- Serĉo de Esperantistaj kontaktoj por sia ĉiutaga laboro (ekzemple profesia aĉetisto serĉu vendistojn);
- Kunlaboro kun Esperanto-turismo;
- Kontakto kun Komercaj Ĉambroj. (Vidu la agadon de S-ro Gilbert en Bar le Duc, "Kiu faras kion?");
- Viziti grupe fabrikojn aŭ instituciojn (ekzemple dum la UK, sed ankaŭ dum aliaj aranĝoj);
- Agado en universitatoj fare de studento pri ekonomiko.

Per tiu ĉi listo ni volas alvoki kaj demandi niajn membrojn, ĉu ili havas aŭ praktikas pliajn agadojn. Se jes, bonvolu anonci tion al la redaktoro.

La kampo komerco/ekonomi(k)o estas geiganta; sed ĝi estas fruktodona. Ni rekomendas ankaŭ, ke ĉiu faru ĉefe tion, kio rilatas al sia profesio kaj ĉiutaga laboro, ĉar tie kiel agnoskita spertulo, li/ŝi efikas konvinke al siaj apuduloj.

*La Estraro de IKEF*

---

## Komercaj anoncoj en la revuo Monato

En nacilingvaj gazetoj, ĉirkaŭ duono de la paĝoj estas okupata de komercaj anoncoj. Tio estas la ĉefa enspezofonto por la eldonejoj. Kontraŭe, la esperanta gazetaro enhavas malmultajn, plejofte pormovadajn anoncojn.

La revuo Monato, pro sia internacia legantaro, estas interesa reklamilo por firmaoj kiuj deziras konigi sian nomon kaj siajn produktojn en la tuta mondo. Se en Monato regule aperas tiaj anoncoj, firma financa bazo estas garantita. Krome, tio ebligas pli favorajn abonprezojn por malriĝaj landoj.

Nun okazas enketo ĉe la legantoj de Monato. Fine de la jaro, la rezultoj estos disponeblaj. Konsiloj de fakuloj por prezenti tiujn rezultojn en taŭga kaj alloga formo al kandidat-anoncantoj estas bonvenaj ĉe la eldonejo aŭ ĉe mi.

*Roland Rotsaert*

## Kion okazigos IKEF dum la kongresa semajno en Vieno?

Dum la ĉi-jara Universala Kongreso en Vieno okazos jenaj IKEF-aranĝoj:

- **Generala Kunveno** (laŭstatuta jarĉefkunveno)
  **Lundo, 27 julio 1992, 16.00 h en salono Wüster**

  Programo:

  1) Pridiskuto de la raporto pri la agado de IKEF dum la jaro 1991 kaj de la financa raporto por 1991, ambaŭ publikigitaj en La Merkato n-ro 36 de aprilo 1992;

  2) Diskutado pri celoj kaj agadoj de IKEF;

  3) Elektoj al la Estraro;

  4) Diversaĵoj.

- Vizito ĉe **firmao SIEMENS AUSTRIA** en Vieno kun rigardado de la fabriko pri elektronikaj komponentoj;
  **Ĵaudo, 30 julio 1992, 9.00 h**

- Vizito ĉe **Bundeswirtschaftskammer** (Federacia Ekonomia Ĉambro);
  Informigo pri la taskoj de la ĉambro konsidere al la aŭstria ekonomio kaj al la komercaj rilatoj kun la najbaraj ekssocialismaj landoj;
  **Ĵaudo, 30 julio 1992, 14.00 h**

  Pri detaloj kaj transporteblaĵoj al ambaŭ lokoj vi estos informitaj dum la Generala Kunveno lunde.

Por la Estraro
*Franz Josef Braun*

---

## Internacia Studumo pri Turismo kaj Komerco

Sub gvido de Monda Turismo dum la lerneja jaro 1992-1993 denove okazos studumoj pri turismaj kaj pri komercaj temoj en Bydgoszcz. Kosto de la naŭmonata studado egalas al 600 nederlandaj guldenoj.

Informoj: Monda Turismo, Str. M. Sklodowskiej-Curie 10, PL-85-094 BYDGOSZCZ

(el: Eventoj, junio (1)-92) /RR

**Revuo Monato**

Ekde januaro, Stefan Maul ne plu estas ĉefredaktoro de la revuo Monato. Por anstataŭi lin, la eldonejo dungis por ĉiu fako (kulturo, politiko, ...) "partredaktoron", kiu kolektas kaj redaktas la proponitajn artikolojn pri sia specialaĵo.

Tiel mi iĝis partredaktoro por la fako "ekonomio". Por garantii la diversecon de la enhavo de Monato, mi alvokas la membrojn de nia fakgrupo, kiuj scias pri ekonomia aŭ komerca novaĵo en sia lando, kiu povas interesi internacian publikon, verki artikolon pri tio.

Ĉar 1992-1993 estos grava transirperiodo por la Eŭropa Komunumo, mi aparte ĝojus pri artikoloj kiuj pritraktas la lastajn preparojn (en 1992) kaj la unuajn praktikajn sperton (en 1993) de la unuigita merkato.

*Roland Rotsaert*

**Komercdeziraj leteroj!**

"Kontakto" serĉas "Kontakto": Ukraina Esperanto-agentejo "Kontakto" serĉas samideanojn por turistaj, aferaj kaj sciencaj kontaktoj laŭ adreso:

270009, Ukrainio, Odeso, str, Perekopskaja divizija, 23, Telefonoj: 630930, 636386, Telekso: 232243 CNTTM SU, Telefakso:634419, Tamara **Popova**, prezidantino.

Eksporto: ŝaf-lano, kapro-lanugo kaj mielo de alta kvalito:

S-ro. Vladimir Ĥoroŝilov , ul. Partizanskaja 13, Soloneŝnoje, Altajskij kraj, 659672, Ruslando

Turismo: Kiu volus financi aŭ kune konstrui turismajn restadejojn en pitoreskaj lokoj de la montaro Altaj, aŭ interŝanĝi turismajn grupojn senvalute. Skribu al:

S-ro Anatol **Gonĉarov** , selo Matveevka, Soloneŝenskij r-n, Altajskij kraj, 659672, Ruslando

Bedaŭrinde nedefinita: Serĉas komercajn kontaktojn (laŭ persona letero speciale en Germanio) pola-nederlanda paro loĝanta en Nov-Zelando. Oni sin direktas konscie ankaŭ al ne Esperanto-parolantojn. "Post ricevo de reagoj ni aranĝos la interesitojn kaj eksplikos ĉion detale.":

**Kazimierz kaj Maria Prusakowski, 69 Owen St., Newtown, Wellington, Nov-Zelando/New Zealand.**

Ĵus ricevita aldona informo: temas pri partnereco de kompanio AMWAY. /dk

**Projektproponoj por IKEF**

**disponas S-ro Volker Hank, tel: +49.(0)6643.8865**

Mi estas nova ĉu IKEF-ano ĉu esperantisto. Tamen mi proponas la jenajn projektojn al la legantaro de "La Merkato" kaj la estraro de IKEF. Se vi jam laboras pri iu ajn de tiuj projektoj bonvolu diri al mi.

Projekto unu:
Mi firme kredas ke ni nur povos pliforigi nian lingvon se iuj personoj aŭ firmaoj povas ŝpari monon kun ĝi.
Tial ĉiuj IKEF-anoj evoluigu skizo de tipaj firmaoj kiuj povus ŝpari monon kun Esperanto. Parto du de la Projekto estus trovi tiujn firmaojn kaj parto tri estus konvinki tiujn firmaojn uzi Esperanton.

Projekto du:
En Germanujo ekzistas ligo de impostpagantoj. (germana: "BdST - Bund der Steuerzahler"). Ni devus prikalkuli la tradukkostoj kiuj ekestas en la EK aŭ ĉe UN kaj demandi tiu ligo pri kunlaboro. Eble aukaŭ en negermanaj landoj ekzistas ligo de impostpagantoj. Se jes, bonvolu diri al mi.

Projekto tri:
Ĉu vi jam aŭdis pri la projekto "komunikado en la europa komunumo" ?
Inter aliaj faktoj tiu projekto konstatis ke la tradukkostoj ĉe la EK estas ĉirkaŭ 797.820.000 Ekuoj !!! (Vidu la proponata projekto du)
Se vi interesas pro tiu projekto de UEA, ILEI kaj EEU la projektanoj certe donos broŝuron kun detalaj informoj al vi. Mi volonte nomas la landan kunlaboranton, ĉar mi havas tiun broŝuron.
Mi proponas ke IKEF ankaŭ kunlaboros en tiu projekto.
Mi volonte komencos propono unu kaj du aŭ kunlaboros en iu projekto.

Volker Hank, Lindenstrasse 2, D-W-6425 Lautertal-Hoergenau, Germanujo
Internet: vogelsberger@dcfged.dus.net
Compuserve: 100021,3033
GeoNet: geod:vogelsberger

## Bonvenon al niaj novaj aliĝintoj!

S-ro Yvon **Poupeau**, (IKEF 148), 21, Résidence de la Lorraine, F-77190 DAMMARIE LES LYS, Francio

S-ro Gafur **Mansurov**, (IKEF 149), 58-151 Vosstanija St., SU-620098 EKATERINBURG, Ruslando

D-ro Bodo **Schneider**, (IKEF 150), Moelenwisch 20A, D-W-2000 HAMBURG 61, Germanio

S-ro Xiong **Linping**, (IKEF 151), Yinshi Fuwu Gongsi, CN-336500 XINYU, TIANGXI, Ĉinio /RR/dk

## Donacoj

La kasisto kore dankas pro jenaj ricevitaj donacoj:

Lee (Hongkongo) 733 BEF
Pirlot (Belgio) 500 BEF
Polerani (Italio) 400 BEF
Cwik (Belgio) 600 BEF
Komerca ĉambro Bar le Duc (Francio) 2.000 BEF /RR

## Instruigaj projektoj pri ekonomio

Post la malapero de la fera kurteno venis inundo da komercaj proponoj el orienta Eŭropo. Samtempe evidentiĝis ke ekzistas grandega bezono por konatigi komercistojn el tiuj landoj kun la okcidentaj komercaj kutimoj.

De diversaj flankoj mi aŭdis pri personoj, kiuj preparas kurson pri iu komerca temo. Por eviti ke pluraj personoj faras la saman laboron, mi invitas ĝiujn kiuj aktivas tiurilate anonci sin ĉe mi. Mi klopodos iom kunordigi la projektojn.

*Roland Rotsaert*

**Subskribintoj respondecas** pri la enhavo de siaj artikoloj. La aperigo entute ne signifas samopinion, nek de la eldonanto, nek de la redaktoro.

La **rajtoj de represo** estas malferma, kondiĉe ke la fonto estas klare indikota. Pruvekzempleroj estas petataj.

**Reklamtarifoj**, en belgaj frankoj: tutpaĝe 1800; ½ paĝo 900; ¼ paĝo 500. 33% rabato por tri-foja sinsekva aperigo de la sama anonco. Membroj ĝenerale ricevas rabaton de 25%.

**Akiri anoncojn** estas ege utila rimedo por subteni nian movadon; eĉ duflanke ekonomie: finance kaj reputacie. /dk